

Espero Katolika



Numero 1-3/2014

Januaro-Marto 2014



Sur la kovrilo: Kardinaloj ĉirkaŭ la Papo en la Baziliko de sankta Petro en Vatikano. Papo Francisko kreis 19 novajn kardinalojn dum la Konsistorio de la 22a de Februaro (v. p. 6).

ENHAVO

1-an de Januaro 2014: 47-a Monda Tago de la Paco	
Mesaĝo de la Papo	3
Preĝosemajno por la Unueco de la Kristanoj	
Prezento de la temo "Ĉu Kristo estas dividita?"	4
Gvidlinioj de la Semajno tradukitaj en Esperanto	4
La unueco en la vortoj de Papo Francisko	5
Konsistorio 2014	
La novaj kardinaloj	6
La nova vatikana ŝtatestretario	6
Homaj mizeroj kaj migrantoj en la zorgemo de Francisko	
Mesaĝoj de la Papo por la Karesmo	7
kaj por la Monda Tago de la migranto kaj de la rifuĝinto	8
Ekumenaj Esperanto-aranĝoj 2014	
20-a Ekumena E-kongreso	9
Ekumenaj Bibliaj Tagoj kun ADORU	12
Iom pri la religiemo en la verkoj de Mikelanĝelo	13
SANKTA PIO LA 10-a: 100-a datreveno de lia morto	15
Li eksciis pri Esperanto el Pastro Luigi Giambene	15
Liaj eldiroj pri Esperanto	16
PASTRO ÉMILE PELTIER: la fondinto de ĉi tiu revuo	16
FUNEBRE	17
MOVADÉ	18

Radio Vatikana, 19 - Landaj Repraesentantoj, 20

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

UEA-konto "ikue-v" * Banko: "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H076010320000023290000 - BIC/SWIFT: BPPHITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Beloŝević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

FRATECO FUNDAMENTO KAJ VOJO POR LA PACO

Resumo de la mesaĝo de la Papo por la Monda Tago de la Paco 2014



1. Enkonduko

La unua mesaĝo de Papo Francisko por la Monda Tago de la Paco komenciĝas per bondeziro de ĝojo kaj espero; poste li rimarkigas, ke la disvastigo de la interkomunikiloj, unuflanke instigas en la homoj la deziron al la frateco, al justeco kaj paco, sed aliflanke tion kondukas al ia “globalizado de la indiferenteco”, kiu alkutimigas nin al sufero de la aliuloj.

2. «Kie estas via frato?»

Ni devas konscii pri la plano de Dio, laŭ kiu ĉiuj homoj devenas de la samaj gepatroj, Adamo kaj Eva. Tamen la mortigo de Habel fare de Kain atestas, ke jam de la komenco en la homo estas enskribita ne nur la alvoko al la frateco, sed ankaŭ la ebleco ĝin perfidi.

3. «Kaj vi ĉiuj estas fratoj»

La fundamento de nia frateco estas en la patreco de Dio. La dia amo, kiam oni akceptas ĝin, aliformigas nian ekziston. La homara frateco estas renaskita de la morto kaj resurekto de Kristo. Li repaciĝas en si mem ĉiujn homojn; en Li la aliulo estas akceptata kiel frato.

4. Frateco, fundamento kaj vojo por la paco

Ankaŭ la nacioj devas renkontiĝi en frata etoso por konstrui la komunan estontecon de la homaro. Pro tio la plej riĉaj popoloj havas la devojn strebi al solidareco, al socia just-

eco kaj al universala karitato, ĉar la paco aŭ estas ĉies bono aŭ nenies.

5. Frateco, por venki la malriĉecon

La manko de frateco inter la popoloj kaj inter la homoj estas kaŭzo de malriĉeco, ne nur materia, sed ankaŭ de homaj interrilatoj, pro la manko de frataj rilatoj. La posedo de bonoj estas deca, kaj eĉ necesa, sed ĉi tiuj devas utili ankaŭ al la aliuloj. Per vivostilo sobra kaj esenca oni kunpartigu sian riĉaĵojn.

6. La remalkovro de la frateco en la ekonomio

La gravaj nuntempaj krizoj ekonomiaj naskiĝas el la iom-post-ioma malapudiĝo de Dio kaj de la proksimulo en la avida serĉo de la materiaj bonoj. Ke la nuntempa krizo estu favora okazo por reakiri la virtojn de la prudento, de la sobereco, de la justeco kaj de la forteco.

7. La frateco estingas la militon

Multaj fratoj suferas pro la militoj. La Eklezio portas al ili sian helpon pere de la preĝo kaj de la servo al la vunditoj, malsatuloj, rifuĝintoj. Sed por savi la homaron el la milito necesas la konvertiĝo de la koroj, kiu agnosku en la aliulo fraton.

8. Ne al la subaĉeto kaj al la krimorganizo

La egoismo, kiu disvolviĝas per subaĉeto kaj per krim-organizoj, grave damaĝas la kreitaĵon. Tamen la homo povas konvertiĝi, kaj oni devas esperi pri la ebleco ŝanĝi sian vivon.

9. La frateco helpas prigardi la naturon

La homa familio devas administri respondecas la naturon ricevitan de la Kreinto. Sed ofte ni pro avido kaj deziro de povo, ne gardas ĝin, ne disponigas ĝiajn donacojn, favore al la gefratoj. Ili sufiĉus por ĉiuj, tamen milionoj da homoj suferas pro malsato: tio estas skandalo.

10. Konkludo

Necesas, ke la frateco estu malkaŝata, amata, spertata, anoncata kaj atestata; sed

nur la amo al Dio kuntrenas nin al la plena praktikado de la frateco. Ke Maria, Patrino de Jesuo, helpu nin.

La kompletan esperantigitan tekston de la mesaĝo oni povas deŝuti ĉi tie:

<http://www.ikue.org/papoj/francisko/2014/20140101.pdf>

“ĈU KRISTO ESTAS DIVIDITA?” (1 Kor 1,13)

De la 18a ĝis la 25a de Januaro 2014 - Preĝosemajno por la Unueco de la Kristanoj

De pli ol unu jarcento, ĉiujare, de la 18a ĝis la 25a de Januaro, t.e. inter la festotagoj de la “Katedro de Petro” (aŭ de la “Konfeso de Petro”, laŭ la protestantoj) kaj tiu de la “Konvertiĝo de Sankta Paŭlo”, oni celebras en ĉiuj kristanaj komunumoj, la oktagon de preĝoj por la unueco de la Kristanoj. La ĉijara temo elvenas el la unua letero al la Korintanoj:

“Mi petegas vin, fratoj, per la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolunion saman, kaj ke estu neniam skismoj inter vi; sed ke vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo. Ĉar pri vi, miaj fratoj, estas sciigite al mi de la domanoj de Hloe, ke ekzistas inter vi malpacoj. Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi diras: «Mi estas de Paŭlo», kaj «Mi de Apolos», kaj «Mi de Kefas», kaj «Mi de Kristo».

Ĉu Kristo estas dividita? Ĉu Paŭlo krumiĝis por vi? Aŭ ĉu vi baptiĝis en la nomo de Paŭlo?

La ĉijara temo por la Semajno de Preĝoj por la unueco de la Kristanoj estis proponata de la kanadaj fratoj. Kanado estas lando markita de diversecoj de lingvoj, kulturoj, etnoj, kristanismoj, eĉ de klimatoj. En tiomaj diversecoj, jen la alvoko al la komuna preĝado en la konscio, ke Kristo estas unu, kiel skribis Paŭlo al la Korintanoj.

En Korinto la Eklezio estis disŝirita de malkonkordoj inter kristanoj partianoj de diversaj grupoj: “Mi estas de Paŭlo, mi de Apolos, mi de Kefas kaj mi de Kristo ...”. Tia



paradokso montriĝas ofte en la historio de la Eklezio: esti disigitaj en la nomo de Kristo. La fideleco en la Evangelio de Kristo, anstataŭ unuigi la malsamajn kristanajn tradiciojn, naskas konfliktojn. Sed tio devas ne plu okazi. Ni ne plu povas montri nin disigitaj antaŭ la disvastigo de persekutoj kontraŭ la kristanoj, sed ankaŭ antaŭ la disvastigo de la kristanismo en foraj kontinentoj, kie oni ne povas kompreni la kialojn de niaj disigoj. Ni devas atesti nian unuecon en Kristo antaŭ la malamikoj kaj antaŭ la novaj amikoj. En ĉi tiu semajno ni partoprenu en la komunaj preĝoj, aŭ almenaŭ, ni preĝu laŭ la instigo de la Sinjoro “Por ke ili estu unu”.

En ĉi tiu perspektivo ni ĉiuj estas varme invitataj al la Ekumena Kongreso de Trento (Italio), kiu okazos de la 16a ĝis la 22a de Aŭgusto 2014.

GVIDLINIOJ PRI LA SEMAJNO ANKAŬ EN ESPERANTO

Ankaŭ por la ĉi-jara preĝosemajno por la unueco estis realigita la traduko de la tekstoj aprobitaj de la Papa Konsilio por la Akcelo

de la Unueco de la Kristanoj kaj de la Komisiono “Fido kaj Konstitucio” de la tutmonda Konsilio de la Eklezioj (WCC).

La traduko estas komuna laboro de bonvolaj personoj, kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montris propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj “Ke ĉiuj estu

unu.” La tradukon faris 14 gefratoj el 10 landoj de ĉiuj kontinentoj, kun la kunordigo de la vicprezidentino de IKUE Marija Belošević. La tradukaĵo deŝutebla ĉe:

<http://www.ikue.org/ekumenismo/preghosemajno/semajno2014.htm>

LA PAPO FERME DE LA PREĜOSEMAJNO

“*Kune iri estas jam konstrui la unuecon*”: ke la kristanoj povu superi la dividojn kaj esti unuigitaj de la forto de la Spirito. Jen resume la kernaj konceptoj, kiujn Papo Francisko proponis la 25an de Januaro dum sia prediko okaze de la vesperaj preĝoj en la baziliko de sankta Paŭlo ekster la muregoj en Romo, por la fermo de la preĝosemajno por la unueco. Partoprenis en la preĝado la reprezentantoj de aliaj Eklezioj kaj ekleziaj komunumoj.

“*Oni ne povas dividi Kriston! La dividoj de la kristanoj estas skandalo; ni ĉiuj estis damaĝitaj*”. Ĉe la tombo de Paŭlo apostolo tiel Francisko admonis. “*Por ne krei skandalon, ni kune iru*”, li instigis, “*plue al la unueco. La unueco estas ĉiam pli supera ol*

Tamen restas la certeco, ke malgraŭ la malfacilaĵoj Kristo akompanas ĉiujn. “*Nur Li povas esti la principo, la motivo, la motoro de nia unueco. Fronte al Li ni pli kaj pli konscias, ke ni ne povas taksi la dividojn en la Eklezio kiel fenomeno iamaniere natura, neevitebla. Niaj dividoj vundas lian korpon, vundas la ateston, kiun ni estas vokataj doni pri Li en la mondo*”.

La unueco al kiu sankta Paŭlo vokis la komunumon de Korinto estas unuanimeco de parolo kaj unueco de penso, kaj ili, admonis la Papo, “*ne povas esti fruktoj de homaj strategioj*”.

“*Dum ni rigardas dankeme al la antaŭenpaŝoj, kiujn la Sinjoro ebligis al ni plenumi, kaj sen kaŝi la malfacilaĵojn alfrontatajn de la hodiaŭa ekumena dialogo, ni petu, ke la sentoj de Kristo superŝutu nin, por povi iri al la unueco, kiun Li volas*”.

Papo Francisko poste memorigis la ekumenan sindevigon, propran de la Posteulo de Petro danke al liaj antaŭuloj Johano la 23a, Paŭlo la 6a, Johano Paŭlo la 2-a: “*La agado de tiuj Papoj igis, ke la ekumena dialogo fariĝu esenca aspekto de la paŝtista servado de la Episkopo de Romo, tiom ke hodiaŭ oni ne komprenus plene la*



konfliktoj; tiu repacigita diverseco, donaco de la sankta Spirito, ne alvenos je la fino kiel miraklo, sed ĝi alvenas laŭlonge de la kuna irado. Se ni ne iras kune, se ni ne preĝas unuj por la aliaj, se ni ne kunlaboras por multaj aferoj, kiujn ni povas fari en ĉi tiu mondo por la Popolo de Dio, la unueco ne alvenos!”.

petran servadon sen inkluzivi la malfermon al dialogo kun ĉiuj kredantoj je Kristo”.

“*La ekumena irado – konkludis la Papo – ebligis pliprofundigi la komprenon de la paŝtista servado de la Posteulo de Petro kaj ni devas konfidi, ke ĝi daŭre efikos ĉi-sence ankaŭ en la estonteco*”.

LA NOVAJ KARDINALOJ

Dum la Konsistorio de la 22a de Februaro Papo Francisko nomumis 19 novajn kardinalojn el 15 landoj. Jen la nomoj de la 16 papaj elektantoj: mons-ro Pietro Parolin, titulara ĉefepiskopo de diocezo Acquapendente, ŝtatestretario; mons-ro Lorenzo Baldisseri, titulara ĉefepiskopo de diocezo Diocletianensis, ĝenerala sekretario de la Sinodo de la episkopoj; mons-ro Gerhard Ludwig Müller, emerita ĉefepiskopo-episkopo de Regensburg, prefekto de la Kongregacio por la Doktrino de la Kredo; mons-ro Beniamino Stella, titulara ĉefepiskopo de Midila, prefekto de la Kongregacio por la Pastraro; mons-ro Vincent Gerard Nichols, ĉefepiskopo de Westminster; mons-ro Leopoldo José Brenes Solórzano, ĉefepiskopo de Managvo; mons-ro Gérald Cyprien Lacroix, ĉefepiskopo de Québec; mons-ro Jean-Pierre Kutwa, ĉefepiskopo de Abiĝano; mons-ro Orani João Tempesta, O.Cist., ĉefepiskopo de Rio de Janeiro; mons-ro Gualtiero Bassetti, ĉefepiskopo de Perugia-Città della Pieve; mons-ro Mario Aurelio Poli, ĉefepiskopo de Buenos Aires; mons-ro Andrew Yeom Soojung, ĉefepiskopo de Seulo; mons-ro Ricardo Ezzati Andrello, S.D.B., ĉefepiskopo de Santiago de Ĉilio; mons-ro Philippe Nakellentuba Ouédraogo, ĉefepiskopo de Ouagadougou; mons-ro Orlando B. Quevedo, O.M.I., ĉefepiskopo de Cotabato; mons-ro Chibly Langlois, episkopo de Les Cayes.

Kun ili estas 3 emeritaj ĉefepiskopoj, kiuj distingiĝis pro sia servado al la Sankta Seĝo kaj al la Eklezio: mons-ro Loris Francesco Capovilla, titulara ĉefepiskopo de Mesembria, sekretario de Johano la 23a; mons-ro Fernando Sebastián Aguilar, emerita ĉefepiskopo de Pamplona; mons-ro Kelvin Edward Felix, emerita ĉefepiskopo de Castries.

LA NOVA VATIKANA ŜTATSEKRETARIO

Inter la kardinaloj nomumitaj de Papo Francisko estas la nova vatikana ŝtatestretario Piero Parolin, naskita en urbeto Schiavon (Vicenza, Italio) la 17an de Januaro 1955. Li estas filo de feraĵvendisto Luigi kaj de Ada, instruistino en elementa lernejo. Kiam li estis 10-jaraĝa lia patro mortis pro strataĉcidento; la patrino prizorgis lin kaj liajn du gefratojn, Maria Rosa kaj Giovanni, hodiaŭ juĝisto.

14-jaraĝa li eniris porpastran seminarion en Vicenza; li pastrigis la 27an de Aprilo 1980. Dum du jaroj li estis vicparohestro en la urbo Schio; poste liaj superuloj sendis lin al Romo por kompletigi la studojn en la papa universitato Gregoriana, kun la celo igi lin funkciulo de la dioceza tribunalo. En Romo lia vivo ŝanĝiĝis:

la episkopo de Vicenza disponigis al la Sankta Seĝo la junan pastron, kiu restis en Romo por eniri en 1983 en la papan eklezian Akademion. En 1986 li doktoriĝis pri kanona juro.

Dum sia restado en Romo, ekde 1996 ĝis 2000 li estis direktoro de Villa Nazareth, institucio fondita post la fino de la dua mondmilito de kardinalo Domenico Tardini por subteni la edukadon de meritoplenaj geknaboj, kiuj ne havas monrimedojn.



En la Konsistorio partoprenis ankaŭ la emerita Papo Benedikto la 16a, por la unua fojo ĉeestanta dum solena liturgio en la vatikana Baziliko post sia rezigno. Salutante Papon Franciskon, per gesto el granda humileco li deprenis sian ĉapon.



Mons-ro Pietro Parolin

Enirinte la diplomatian servon de la Sankta Seĝo li agadis en la nunciejoj de Niĝerio (1986-1989) kaj Meksikio (1989-1992); en la latinamerika lando li gvidis la intertraktojn, kiuj realigis la juran agnoskon de la katolika Eklezio kaj la starigon de diplomatiaj rilatoj kun la Sankta Seĝo. En 1992 li revenis al Romo kaj eklaboris en la ŝtatestrekariejo, komence ĉe la dua sekcio (rilatoj kun la Ŝtatoj) kaj de 2000 en la itala sekcio kiel kunlaboranto de la episkopo, hodiaŭ kardinalo Attilio Nicora. Li prizorgis la armean episkopecon kaj religian asistadon por enkarcerigitaj kaj malsanuloj en hospitaloj.

En 2002 li estis nomumita subsekretario de la sekcio por la rilatoj kun la Ŝtatoj kaj li okupiĝis pri la rilatoj de la Sankta Seĝo kun la aziaj landoj, aparte kun Ĉinio (li vizitis dufoje Pekinon) kaj Vjetnamio. Li donis krome fundamentan kontribuon por la aliĝo de la Sankta Seĝo al la Traktato pri Nuklea Neproliferado.

Aŭguste de 2009 li estis nomumita titulara ĉefepiskopo de diocezo Acquapendente kaj

apostola nuncio en Venezuelo, en periodo sufiĉe malfacila por la rilatoj inter la Eklezio kaj la landaj politikaj aŭtoritatoj. Septembre de tiu sama jaro li ricevas de Benedikto la 16a la episkopan ordinon.

La 31an de Aŭgusto 2013 Papo Francisko nomumis lin ŝtatestrekariejo, posteulo de kardinalo Tarcisio Bertone, kiu atingis aĝolimon. Lia ofico komenciĝis oficiale la postan 15an de Oktobro, per mallonga ceremonio, en kiu li ne povis partopreni pro eta ĥirurgia operacio. La 16an de Decembro 2013 li estis aligita al la Kongregacio por la Episkopoj. La 15an de Januaro Papo Francisko, post lia kardinaliĝo, nomumis lin membro de la kardinala komisiono por gardado de la Instituto por la Verkoj de Religio (IOR), la tiel nomata “vatikana banko”.

Piero Parolin (58-jaraĝa je la tago de la nomumo) estas la plej juna vatikana ŝtatestrekariejo depost Eugenio Pacelli, kiu estis nomumita en 1930, unu monaton antaŭ sia 54a naskiĝdatreveno.

PER LA KARITATO KURACI ĈIUN MIZERON

Dum la tempo de Karesmo la Eklezio estu “inklina kaj zorgema” en la kuracado de ĉiu materia, morala kaj spirita mizeroj, per la anonco de la Evangelio kaj per konkreta karitato. Tion skribis Papo Francisko en sia mesaĝo verkita por la komenco de la 40-taga periodo prepare al Pasko, kiu ĉi-jare komenciĝis la 5an de marto, cindromerkredo.

Tri mizeroj neniam mankis en la mondo. Havi nenion – aŭ havi tro malmulte – por digne vivi meze de la aliaj; havi koron kaj menson bruligitajn de ia sklaveco; havi la manojn ankaŭ plenajn je posedaĵoj, sed animon malplenan, kiu ne kapablas kredi je io ajn, ĉar nenio valoras la penon. Kaj aliflanke estas la antidoto, tio estas la Evangelio. Laŭ Papo Francisko Karesmo esence konsistas el priflego de la unuaj, la mizeruloj, praktikante la duan, la Evangelion.

Dio estas Patro, kiu en Jesuo ne hezitas fordoni kaj oferi sin por la amataj kreitaĵoj. La karitato, la amo, estas kompleta kundivido de la destino de la amato. Kaj ĉi tiu speco de amo igas similaj, kreas egalecon, faligas murojn kaj distancojn. La malriĉeco, per kiu Jesuo liberigas kaj riĉigas nin, kiel



skribis sankta Paŭlo apostolo, estas lia maniero ami nin, fariĝi proksima al ni. Kaj por la kristanoj, ĉiam, kaj aparte dum Karesmo, ne estas alia vojo ol la imitado de la Majstro.

“Karaj gefratoj – estas la deziro de la Papo – ke Karesmo trovu la tutan Eklezion inkлина kaj zorgema atesti al tiuj, kiuj travivas materialan, moralan kaj spiritan mizeron la evan-

gelian mesaĝon. Sed ni povos fari tion – li substrekas – laŭmezure, ke ni konformiĝos al Kristo, kiu fariĝis malriĉa kaj riĉigis nin per sia malriĉeco”. “Karesmo estas taŭga tempo por la seniĝo, kaj estos bone demandi al ni mem, je kiuj aĵoj ni povas seniĝi, por helpi kaj riĉigi aliajn per nia malriĉeco. Ni ne forgesu, ke la vera malriĉeco dolorigas: ne validas seniĝo sen pentofara dimensio. Mi ne fidus je almoz-donado, kiu kostas nenion nek dolorigas”.



“MIGRANTOJ KAJ RIFUĜINTOJ NE ESTAS PEONOJ SUR LA ŜAKTABULO DE LA HOMARO”

Por la 100a jaro soleniĝis la 14an de Januaro la Monda Tago de la migranto kaj de la rifuĝinto, starigita de Benedikto la 14a en 1914, je la eksplodo de la unua mondmilito.

Ili estas “longa vico” daŭre iranta pli ol 45 milionoj la rifuĝintoj, 230 milionoj la migrantoj. Kaj 2013 estis la jaro, dum kiu registriĝis la plej alta nombro da viktimoj ĉe ili, sed la entutan nombron da forpasoj oni neniam konos, ĉar ne eblas kulkuli ĉiujn viktimojn, kiuj perdiĝis en la maroj aŭ en la sabloj de la dezertoj. Laŭ Unuiĝintaj Nacioj (datumoj de Oktobro 2013) pasintjare la



migrantoj konsistigis 3,2% de la monda loĝantaro, pliaj 78 milionoj kompare kun 1990, kaj virinoj inter ili estis 48%. Dum la jaroj ŝanĝiĝis la motivoj de la foriroj: opinii, ke temas nur pri ekonomia motivo estas limige, ĉar la fenomenon provizas ankaŭ migradoj pro naturaj katastrofoj aŭ pro longdaŭraj kaj detruantaj konfliktoj, kiel tiu en Sirio, kiuj estigas konstantajn fluojn da rifuĝintoj kaj fuĝintoj.

La ĉi-jara Tago vidis la fortan mesaĝon de Papo Francisko, kun la temo: “Migrantoj kaj rifuĝintoj: ale al plibona mondo”. Li denove altiras la atenton al ili kiel al grava

elemento por la konstruo de pli bona mondo. Por ke tio okazu – skribis la Papo – necesas pasi el “kulturo de la forĵetaĵo” al “kulturo de la renkonto kaj akceptemo”, superante la facilajn tiojn kaj diskriminaciojn rilate al fremduloj. Ili, fakte, “ne estas peonoj sur la ŝaktabulo de la homaro: temas pri infanoj, virinoj kaj viroj, kiuj forlasas aŭ estas devigataj forlasi siajn hejmojn pro diversaj motivoj”. Pro tio Francisko deziras konstruon de “pli justa socio, pli firmiĝinta demokratio, pli solidareca lando, pli frateca mondo kaj pli kaj pli malfermita kristana komunumo” laŭ la Evangelio.

LA 20-A EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO

67-a IKUE-Kongreso 64-a KELI-Kongreso

Trento - Cadine, Italio, 16-23 de aŭgusto 2014

Ĉefa temo: *Ĉu Kristo estas dividita?* (1 Kor 1,13)

IKUE kaj KELI invitas la Kristanan Esperantistaron al 20-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Trento, Italio. La urbo situas en norda Italio ĉe la landlimo kun Aŭstrio kaj estas facile atingebla per aŭtoŝoseo kaj per trajno.

Ĉi tiu urbo en la jaro 1542 estis elektita kiel sidejo de la tielnomata Koncilio de Trento (1545-1563), per kiu oni klopodis reunigi la kristanajn Ekleziojn post la protestanta Reformacio. Kiel sciante, ĝi ne atingis la celon, sed ĝi kontribuis al la reformado de la Katolika Eklezio. Pro tiuj historiaj kialoj, la papo Paŭlo la 6-a konfidis al la Diocezo de Trento apartan taskon al la ekumena agado.

La urbo estas riĉa je vidindaĵoj naturaj, historiaj kaj monumentaj. Starigita en la valo de la rivero Adige [pr. A'diĝe], ĝi estas ĉirkaŭata de altaj montoj. Laŭlonge de tiu valo pasas la vojoj al norda Eŭropo, pro tio ĝi estis protektita de multenombraj kasteloj ankoraŭ nuntempe bone konservitaj.

Nia kongresejo estos ĉe "Centro Mariapoli" en Cadine [pr.: Ka'dine], vilaĝo en la komunumo de Trento, sed iom for de la urbocentro kaj meze de la montaro, tamen facile atingebla per aŭtobuso (lokaj esperantistoj estos pretaj helpi ĉe la stacidomo). Centro Mariapoli [pr.: Ĉentro Maria'poli] estas ekumena centro de "Movimento Focolari" (Movado de la Fajrujoj), kiu multe agas favore de la interreligiaj rilatoj. Tie kunvenas ne nur kristanoj, sed ankaŭ fideluloj de aliaj religioj, pro tio en la Centro ne ekzistas kristana preĝejo, sed oni pretigas ĉiufoje taŭgan ejon por preĝi laŭ la kredaparteno de la kunvenintoj.

La devizo de la temo de nia kongreso estas tiu jam adoptita por la Semajno de Preĝoj por la Unuiĝo de Kristanoj 2014: "Ĉu Kristo estas dividita?" (1 Kor 1,13) kaj la temo estos precipe pritraktita laŭ la letero al la Efezanoj (4,1-6), en kiu la malliberigita apostolo Paŭlo strebas por la unueco ("estas unu korpo, unu Spirito ... unu espero ... unu Sinjoro, unu fido, unu bapto, unu Dio kaj Patro de ĉiuj ..."). Tiaj estu ankaŭ niaj sentoj.

Kongresaj kotizoj:

Tarifo A: Iamaj socialismaj landoj, Azio, Afriko, Latina Ameriko, Oceanio.

Tarifo B: Ĉiuj landoj ne inkluzivitaj sub A.

Kategorio	A	B
Kongresa kotizo ĝis la 30a de majo:	20,00 EUR	50,00 EUR
de la 1a de junio:	40,00 EUR	70,00 EUR
(infanoj ĝis 10 jaroj aliĝas senpage)		
1-lita ĉambro	460,00 EUR	480,00 EUR
2/3/4-lita ĉambro	290,00 EUR	420,00 EUR
16-lita ĉambro *	210,00 EUR	250,00 EUR
Sen tranoktoj, sed kun ekskursoj	30,00 EUR	30,00 EUR

* Du subtegmentaj ĉambregoj kun banĉambroj kaj necesejoj komunaj.

Ĉiuj aliaj ĉambroj havas sian banĉambron.

La kongreso komenciĝos la 16-an de aŭgusto posttagmeze kaj finiĝos la 23-an matene, pro tio la prezo inkluzivas:

- 7 tranoktoj, 7 matenmanĝojn, 6 tagmanĝojn, 7 vespermanĝojn,
- bus-transporton dum pilgrimadoj kaj necesajn enirbiletojn.

Por la ne-loĝantoj: tagmanĝo: € 15,00, vespermanĝo: € 15,00.

Notu bone: **La aliĝo validos post la alveno de la antaŭpago de la kongresa kotizo.**

PAGMANIERO

BANKO: IBAN: IT34 H076 0103 2000 0002 3290 000

BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

adreso: Unione Internazionale Cattolica Esperantista

Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 ROMA-RM (Italia)

UEA konto: “ikue-v” de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - Romo

Atentu: Ne FORGESU skribi la kialon de la pago.

En la adreso ne uzu la mallongigon IKUE.

Eŭropaj bankoj aliĝintaj al sistemo “SEPA” ne postulas komisionojn por alsendi la monon.

ĜENERALAJ ATENTIGOJ:

- La aliĝo validas post la ricevo kaj de la aliĝilo kaj de la aliĝkotizo.
- Ĉiuj aliĝintoj ricevos la konfirmon pri la aliĝilo kaj informojn kiel atingi la kongresejon.
- Post ricevo de la mendo la organizantoj tuj komunikos, ĉu la loĝ-aranĝo elektita estas jam plene okupita.
- Por la plur-litaj ĉambroj, se en la aliĝilo ne estas indikitaj la nomoj de la kunloĝantoj, oni kunloĝigos virojn kun viroj kaj virinojn kun virinoj.
- En kazo de ne alveno la aliĝkotizo ne estos redonata.
- Reston de la sumo oni povas pagi al la banka konto, aŭ surloke nur per kontanta mono (ĉekoj kaj kreditkartoj ne estos akcepteblaj).
- Oni povas pleniĝi kaj sendi la aliĝilon rekte per retroŝto el la retejo:

www.ueci.it/EEKalighilo/

- Dum la kongreso ni preĝos per la libro ADORU. Nepre kunportu ĝin.
- Por kontakti la organizantojn skribu rete al:

eekongreso@gmail.com

aŭ per ordinara poŝto al:

**Unione Esperantista Cattolica Italiana
via Lombardia, 37
I-20099 Sesto San Giovanni (Italio)**

KONGRESA PROGRAM-SKIZO:

Sabato 16.: Dumtage: akcepto de la kongresanoj. Vespere: Inaŭgura vespero.
Dimanĉo 17.: Sankta Meso, Evangeliana Diservo, Ekumena Diservo, Solena malfermo de la kongreso.
Dumsemajne: ĉiutage: Sankta meso, komuna kantado, ekumena preĝo, prelegoj. Vizito de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj.
Merkredo 19.: Tuttaga ekskurso (loko difinota).
Vendredo 22.: Vespere: adiaŭa vespero.
Sabato 23.: Adiaŭa mateno.

20-a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO

Trento, Italio

ALIĜILO KAJ MENDILO

Sendu al: Unione Esperantista Cattolica Italiana, via Lombardia, 37

I-20099 Sesto San Giovanni - Italio

aŭ rete al: eekongreso@gmail.com

Nomo: _____

Bonvolu skribi la familian nomon MAJUSKLE kaj la personan nomon minuskle

Adreso: _____

Lando: _____ Telefono(j): _____

Reta adreso: _____ viro ino

Mi mendas tranokton en (*bv. krucsigni en krampoj*):

unu-litan ĉambron,

2/3/4-litan ĉambron kun jena(j) kunulo(j) en mia ĉambro:

16-litan ĉambron

Mi ne mendas tranoktojn, sed nur tag- kaj vesper-manĝojn.

Mi deziras vegetarajn manĝojn.

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo - temo, daŭro: _____

Dato de alveno: _____ / _____ Dato de foriro _____ / _____

Notoj: _____

Mi pagas: Kongresan kotizon: _____ EUR

Libervolan kontribuon: _____ EUR

SUME: _____ EUR

Antaŭpagon de _____ EUR mi ĝiris al:

Banka konto de IKUE

IKUE konto ĉe UEA

Dato: _____ Subskribo: _____

La aliĝo validas post alveno de la aliĝ-kotizo

La aliĝilo en formatoj PDF kaj DOC (Word) estas ankaŭ akirebla per retadreso:

www.ikue.org/cz/EEK-Trento/EEK-Trento.htm



EKUMENAJ BIBLIAJ TAGOJ kun Adoru 2014

Tuchoměřice ĉe Prago, Ĉeĥio

En 2014 ili okazos en la Praga antaŭurbo Tuchoměřice (prononcu: Tuĥomjerĵice), de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo (merkredon de la vespermanĝo ĝis dimanĉo post la tagmanĝo).

La Loko

La iama kastelo, nuna klostro Tuchoměřice, Školní 1, 25267 Tuchoměřice apud Prago. La loko estas facile atingebla ne nur per aŭto (se vi havas elektronikan vojmontrilon, enmetu la supran adreson), sed ankaŭ per trajno kaj eŭropaj lini-busoj, ĉar el la centro (ekz. de la stacidomo) de Prago ekzistas linioj de publika trafiko. Temas pri la metroo linio A ĝis la fina stacio: „Dejvická“. De tie oni prenas autobuson, kiu post 30 minutoj atingos la haltejon „Tuchoměřice - zámek“, kiu troviĝas ĝuste antaŭ la kastelo. Eĉ per aviadilo estas facile: La flughaveno de Prago estas tre proksima. Ne ekzistas rekta linio al Tuchoměřice, sed la membroj de la komunumo diris, ke eblas sendi aŭton de la kastelo al la flughaveno por venigi partoprenontojn (nur 15 minutojn da veturado). En la klostro loĝas kaj gastigas de kelkaj jaroj la francdevena juna movado „Chemin Neuf“ (Nova Vojo). Ili renovigis ĝin kaj akceptas grupojn por gvidata aŭ (kiel en nia kazo) propra programo. La loĝado estas simpla, sed bona. (Eblas sendi fotojn, se iu volas vidi.) Ni antaŭmendis 15 ĉambrojn (kun entute 38 litoj), el kiuj 8 havas propran lavabon. Tiu, kiu nepre bezonas unuopan ĉambron, aŭ pli da lukso, tiu povas ankaŭ mendi ĉambron en hotelo „Auberge de Provence“ (www.tuchomerice.cz), je piedira distanco de 5 minutoj. En aliaj kazoj, skribu viajn dezirojn aŭ bezonojn, kaj mi provos plej bone aranĝi, laŭ interkonsento kun vi.

La Prezoj

Por la tuta seminario, la kompleta prezo estas 140 € por okcidentlandanoj kaj 120 € por orientlandanoj (manĝoj, tranoktado, programo).

Se iu ne tranoktos en la klostro, sed manĝos kun ni, tiu pagos 96 € resp. 76 €, sed devos mem prizorgi la tranoktadon. (En la supre menciita hotelo, la kostoj por unu nokto estas 70 €/nokto, do entute 280 € por tranoktado.)

Por aliĝi, simple sendu aŭ rete aŭ papere viajn informojn. Por validigi la aliĝon, okcidentlandanoj ĝiru 40 €, orientlandanoj: 20 € al la konto 62 42 548 541 ĉe Volksbank Hellweg e.G., BLZ 414 601 16. La reston oni pagu surloke!

Atentu: Se vi pagos post la 31-a de januaro, ekfunkcios la nova t.n. SEPA-sistemo de ĝirado! Tiam la bankaj datumoj estos: IBAN: DE82 4146 0116 6242 5485 41. BIC: GENODEM1SOE

La Programo

Ĝi enhavos prelegojn pri Biblia temo, Diservojn kaj kantojn E-lingvajn. Ni multe utiligos kaj la Bibliion, kaj la ekumenan kant- kaj preĝ-libron Adoru. (Kiu ne havas ĝin, diru tion, por ke mi kunportu sufiĉe da ekzempleroj.) Kompreneble ni ekskursos ankaŭ komune al la Praga centro. Ankaŭ el ekumena vidpunkto, Prago estas tre interesa urbo.

Mi esperas, ke la invito interesos vin, kaj ke vi havos eblecon veni. Aliĝu prefere baldaŭ. Se restis demandoj, ne hezitu min kontakti!

Feliĉan jaron 2014 mi deziras al vi, esperante, ke ni restu en reciproka bonvolemo!

Elkore, via

Stefan Lepping, Mellinstr. 5, 59457 Werl, Germanio.

Retadreso: stefanlepping@gmx.de

La aliĝilo estas akirebla el retpaĝo: <http://www.ikue.org/cz/tuchomerice/tuchomerice.htm>

Iom pri la religio en la verkoj de Mikelanĝelo

La 18-an de Februaro 1564, antaŭ 450 jaroj, mortis en Romo Mikelanĝelo Buonarroti. Naskita en 1475 en Caprese, apud urbo Arezzo, li estis homo kun komplika personeco, homo de kredo el plurfaceta arta aspekto: skulptisto, pentristo, arkitekto kaj poeto, rolulo de la itala Renesanco.



Unu el la verkoj de Mikelanĝelo, kiu plej impresas ankaŭ, ĉar ĝi estas ligita kun la lastaj horoj de lia vivo, estas la “Pietà Rondanini” (Kompato: Maria kun la mortinta Filo), la skulptaĵo konservata en la muzeo de kastelo Sforzesco, en Milano (Italio). Kiam Mikelanĝelo mortas la 18an de Februaro 1564, siajn lastajn horojn de konscia vivo, antaŭ ol malsaniĝi, eniri komaton kaj morti, li dediĉas al tiu statuo. Tion rakontis lia lernanto Daniele da Volterra: Mikelanĝelo pasis la lastan nokton – kiu estis antaŭtago de la dimanĉo de Karnavalo, dum la tuta Romo festis – tute sola, en sia hejmo-kabineto en strato Macel de’ Corvi, pensante kaj prilaborante tiun skulptaĵon. Tio komprenigas ĉion pri Mikelanĝelo: lia ideo pri la arto kiel duelo, kvazaŭ batalo inter ideo kaj la kapablo eksperimenti, konstante mediti pri la artaj problemoj.

Sed tiu skulptaĵo – samkiel la aliaj du samtemaj – unu konservata en la baziliko de sankta Petro en Vatikano, la alia en Florenco – ĉefe atestas iamaniere la rilaton inter la patrino kaj la filo: la ĉirkaŭbrako estas bildigita de Mikelanĝelo laŭ diversaj manieroj, sed ĉiam kortuŝaj.

Oni povas diri, ke ĝi estis la problemo, kiu “obsedis” Mikelanĝelon jam ekde june-co. La statuo en la vatikana baziliko datiĝas de 1499: Mikelanĝelo estis knabo apenaŭ 24-jara, kiam li skulptis ĝin. La “Pietà Bandini”, konservata en Florenco, estis de li farita dum la jaroj de plena matureco, kiam Mikelanĝelo havis pli ol 50 jarojn. Fine, kiel dirite, al la lastaj vivojaroj apartenas la “Pietà Rondanini”. La temo estas ĉiam la sama: la mortinta filo kaj la patrino, kiu ĉirkaŭbrakas lin, subtenas lin kaj preskaŭ tute reakiras lin. La temo estas, iusence, tiu de la filo, kiu revenas en la patrinan sinon, kiu generis lin. Ĝi



estas granda kaj fortega temo, kiu estis konstanta en lia arto, esprimita de homo, kiu neniam havis familion, sed jes rilaton al patrino el profunda kaj eksterordinara intenseco.

Alia ĉefverko, kiu tre bone reprezentas la religian spiriton de Mikelanĝelo – homo, kiu havis malpacan, sed kredoplenan vivon – estas la Siksta Kapelo. 450 jarojn post la morto de la artisto ĝi restas unu el la pli vizitataj monumentoj en la mondo: kvin milionoj kaj duono estas la vizitantoj ĉiujare. Ĝi estas grandioza allogaĵo el spirita speco: kiu eniras, tiu komprenas, ke ĝi estas ia identiga loko de la katolika Eklezio, ĉar en ĝi oni elektas la Papon, oni celebras la grandajn liturgiojn. Plie, ĉirkaŭrigardante la Kapelon, oni komprenas, ke la freskoj – ĉiuj kune, ne nur tiuj de Mikelanĝelo, sed ankaŭ tiuj de Botticelli, Ghirlandaio, Perugino, entute pli ol 2000 kvadratajn metrojn granda renesanca pentroarto – konsistigas katekismen prezentitan laŭ la plej kompleta kaj alloga figurmaniero.



Mikelanĝelo kaj Romo

Multajn verkojn la artisto postlasis al Romo. Inter ili estas la aranĝo de la placo sur la Kapitola monteto; la kolosa statuo de Moseo (235 cm alta) por la tombo de Papo Julo la 2a; la freskoj de la Siksta Kapelo, kiujn parte li pentris ankoraŭ juna, 35-jaraĝa; la Volbo de la Kapelo, inaŭgurita dum la papado de Julio la 2a (1503-1513); la fresko de la Lasta Juĝo de li realigita ankoraŭ en la Siksta Kapelo inter la 60a kaj 65a vivojaro. Je la epoko de Papo Paŭlo la 3a (1534-1539) li sukcesis vidi, aranĝita ĝis la tamburumo, la Kupolon de la baziliko de sankta Petro, de li konceptita: li mortis sen vidi ĝian finkonstruon.



“Pietà Bandini”

AL DIO (RIMOJ 285)

Vivkuro mia jam atingis, ve,
fragilŝipete, tra ŝtormanta maro,
havenon, kie foje ĉiu staros,
kantos pri bona kaj malbona kre’.

Nur nun mi vidas, kia estas tromp’,
imag’, laŭ kiu mi konstante vidis
en art’ idolon, reĝon kaj ĝin fidis,
sopir’ pelanta homon al la tomb’.

Ĉu helpas amoj, kiujn vent’ disblovas,
nun kiam mortoj du atingas min?
La unu certas, pro la dua tim’.

Jam nek pentrado, nek skulptado povas
animon helpi sin levintan ĵus
al am’ nin brakumonta de la kruc’.

*Michelangelo Buonarroti,
trad. Jiří Kořínek
(el “Norda prismo” 4-6/1966)*

SANKTA PIO LA 10-a

Solenadoj en la centjariĝo de la morto (1914-2014)

La 23an de Novembro 2013 vespere, okaze de la festo de Kristo Reĝo, la patriarko de Venecio, Francesco Moraglia, startigis la celebroyjn por la centjariĝo de la forpaso de Papo Sankta Pio la 10a, per solena sankta Meso, en la Baziliko de sankta Marko.

Giuseppe Melchiorre Sarto, la estonta Pio la 10a, estis fakte patriarko de Venecio de 1894 ĝis 1903. Por la jaro 2014 estas programitaj dekoj da manifestacioj kaj renkontiĝoj en la tuta venecia regiono kun aparta konsidero pri la komunumo de Riese Pio la 10a, kie li naskiĝis en 1835. Kvankam li prezentiĝis al la homoj kiel paroĥestro de la mondo, li kapablis renovigi la Eklezion en periodo de gravaj sociaj streĉitecoj kaj estigis reformojn en la liturgio, katekismo, juraj kodoj, k.t.p.

La katolikaj esperantistoj elektis lin kiel sian ĉielan patronon, ĉar li montris plurfoje favoron al nia lingvo, ankaŭ dank' al mons. Luigi Giambene, esperantisto, membro de la roma Kurio kaj fondinto en 1905 de la E-Grupo de Romo. Dank' al li, Pio la 10a konatiĝis

kun la katolika E-movado kaj de la 1906 ĝis sia morto en 1914 li sendis plurfoje sian benon al la katolikaj esperantistoj kaj al ilia revuo Espero Katolika.

Luigi Giambene, la pioniro, kiu prezentis nian movadon al Pio la 10-a

Pastro Luigi Giambene estis profesoro de hebrea kaj greka lingvoj en "Propaganda Fide". Naskita la 26an de Novembro 1866 en Romo li estis esperantisto ekde 1902, kaj fondis en Romo en 1905 E-Societon, kiu nomiĝis latinlingve "Imperiosa Civitas"; en 1919 li kunfondis la Roman E-instituton. Li laboris en la roma Kurio (dum kelka tempo en la oficejo por la indulgencoj). Li estis aŭtoro de vortaro kaj lernolibroj, redaktoro de Roma Esperantisto. Li estis la pastro, kiu prezentis al Papo Pio la 10a la unuan jarkolekton de Espero Katolika. Li mortis en Romo la 29an de Junio 1944.



Monsinjoro Luigi Giambene

Eldiroj de Pio la 10-a pri Esperanto

Frato Izidoro Clé (1862-1917), religiulo de la Fratoj de la Karitato, estis direktoro de la “reĝa Instituto por la blinduloj” de Woluwe (Bruselo, Belgio) kaj prezidanto de la belga federacio de la blinduloj. Post partopreno en la internacia kongreso de la blinduloj en Napolo (Italio), dum kiu li estis oficiala delegito de la belga registaro, la 4an de Aprilo 1909 li skribis al la tiama prezidanto de IKUE: “Kara amiko en Kristo. La Napola Kongreso aplaŭde aprobis mian proponon por enkonduki Esperanton en la Blindulejojn. Hodiaŭ mi estis akceptata de nia Sankta Patro la Papo, kiu diris al mi, ke la aprobo de la Napola Blindulara Kongreso pri Esperanto ĝojjigis lin” (EK aprilo 1909, p. 81). Laŭ pluraj artikoloj, dum ĉi tiu privata aŭdienco la Papo estus eldirinta la faman frazon “Esperanto havas antaŭ si grandan

estontecon”: bedaŭrinde la letero de frato Clé ne aperas komplete en EK nek mencias ĝin.

Artikolo aperinta en Espero Katolika, Julio 1922, paĝo 288, konigas alian frazon de la Papo pri Esperanto. “*Antaŭ la unua Katolika Kongreso de IKUE en 1910 la tuta programo estis submetata al la Sankta Patro. Mons-ro Giambene raportis pri tiu aŭdienco al la kongreso kaj i.a. komunikis: “Papo Pio la 10a ankaŭ bonvolis konsenti pri la utileco de Esperanto por konservi la unuiĝon inter la Katolikoj de la mondo”.*

Kvankam tiu “bonvolis konsenti...” konjektigas, ke la Papo mem ne diris precizan frazon, sed verŝajne respondis per jeso al la konstato de Giambene, tamen restas la valoro signo de bonvolemo de tiu sankta Papo rilate al la katolika E-movado.

ANTAŬ 105 JAROJ MORTIS ÉMILE PELTIER



En Februaro okazis la 105a datreveno de la forpaso de la fondinto de ĉi tiu revuo, pastro Émile Peltier. Ekde pli malpli 1901 li suferis pro stomaka malsano kaj pro tio li devis forlasis sian karan laboron (por Espero Katolika). Timante la malvarmecon, li foriris al Pau, kaj post tri monatoj li petis, ke oni alkonduku lin ĝis Lourdes, kie li deziris ricevi resaniĝon de la Sankta Virgulino aŭ morti apud tiu Sanktega Patrino. Tiu lasta religia deziro estis nur efektivigita laŭ la Dia Volo la 17an de Februaro 1909. Ĝis la lasta horo li konservis sian konscion, sian tutan submetiĝon al la volo de Dio, kaj ripetis: “Mia Dio, mi prezentas al Vi mian vivon por Franclando, por mia revuo Espero Katolika, por tiuj, kiuj preĝis aŭ preĝos por mia animo”.

Pri siaj celoj por la revuo de li fondita, li skribis en editorialo aperinta en la numero de Februaro 1904.

GRAVA LETERO DE DOKTORO ZAMENHOF (el E.K. 2/1904)

Aŭtoro de Esperanto skribis leteron al S-ro Seynaeve pri aranĝo de internacia Kongreso de Esperantistoj. Fine de tiu letero, Doktoro Zamenhof starigas jenan principon: «Simile al ĉiu alia lingvo, Esperanto devas esti rigardata kiel *lingvo finita kaj netuŝebla*. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povos nur tiam, kiam nia lingvo estos jam *oficiale akceptita* en la tuta mondo. Ĝis tiu tempo, la netuŝebleco de la lingvo estas la *plej fundamenta* kondiĉo por nia propagando».

Ni tute aliĝas al tiu grava deklaro de l' aŭtoro de Esperanto. *Espero Katolika* uzos kiel eble plej zorge la lingvon Zamenhofan laŭ reguloj kaj modeloj liveritaj de nia majstro.

Kiel ni jam diris, *Espero Katolika* ne estas revuo lingva, sed tribuno malfermita al ĉiuj por libera, pacema diskutado de ideoj, precipe religiaj.

Ni celas unuigi, ne disigi, laŭ parolo de Kristo: «Vero liberigos vin». Ni ja de nun forĵetas ĉiujn priokupojn lingvajn, – kio ne signifas ke ni ne zorgos pri stilo. Laŭ ni, bona stilo estas tiu, kiu *regula* estas laŭ gramatiko, *klara* laŭ senco, *harmonia* laŭ elparolo (1). Ĝis nun, iaj verkistoj sin montris severegaj pri gramatiko, severetaj pri senco (ekzemple en poezio), preskaŭ senzorgaj pri harmonio. Ni penados ne malŝati en E. K. ian el suprenomataj kvalitoj de stilo.

Cetere, Esperantistoj ne malŝparu tempon en etaj malpacoj. Ni ĉiuj laboradu frate, unuige, fervore.

Direktoro de E. K.

(1) Eĉ se la vortfarado ne ĝis nun estis uzita. Kredeble, la preskaŭ senlimaj riĉaĵoj de Esperanto ne jam ĉiuj eltroviĝis.

Ni funebras kaj kondolencas

Prof. Miloslav Pastrňák, Ĉeĥio (1919-2014)



Li naskiĝis la 12-an de oktobro 1919 en Dolní Suchá. Post abiturienta gimnazia ekzameno en Český Těšín 1938 li studis en Prago Filozofian Fakultaton de Karola Universitato. La 17-an de novembro 1939 li estis kun ceteraj studentoj deportita en naziisman koncentrejon Sachsenhausen en Germanio. Liberlasita en 1942 ĝis fino de mondmilito li devige laboris en karbminejo. Post mondmilito li daŭrigis studadon kaj ekde 1947 li laboris kiel mezlerneja profesoro. Post uzurpo de la ŝtatpotenco fare de komunistoj en la jaro 1948 li rifuzis membriĝi al komunista partio, li povis instrui nur ĉeĥan lingvon. Post plua studado en Natursciencia Fakultato en Brno li en 1953 eklaboris en gimnazioj. Pro kristana konfeso li spitis multan diskriminacion. Jare 1949 li geedziĝis kaj li havis filon Václav kaj filinon Jarmila (esperantistinon). Post ideologia kontrolo li devis forlasi pedagogian laboron. Post sufokigo de “Praga printempo 1968” li sin dediĉis al aktivadoj en „subtera eklezio“, gvidante sekretajn familiajn komunecojn kaj okupiĝante pri katekizado de studentoj en privataj loĝejoj. Post falo de komunismo li estis en 1990 rehonorigita. Kvin jarojn li instruis filozofion kiel „unua promociita nemarksisma filozofo en regiono de Ostrava“. De la jaro 1994 li plu gvidis familiajn religiajn komunecojn kaj bibliajn rondetojn. Li estis longjara membro de preĝeja kantkoruso. Inter liajn la plej grandajn hobiajn apartenis Esperanto. Por tiu lingvo li varbis multajn favorulojn, li instruis ĝin en interesrondetoj kaj ĝis fino de la vivo li agadis kiel faka konsilisto kaj korektisto de revuoj *Starto* kaj *Dio Benu*. Li prelegis en la 48-a IKUE-Kongreso 1995 en Olomouc, Ĉeĥio. Ĝis lasta vivmomento li restis longjare aktivanta membro de IKUE. En la jaro 2001 mortis lia edzino Marie kaj en la jaro 2003 lia filino Jarmila. Ekde la jaro 2008 li loĝis en Pensiulejo de Sankta Elizabeta en Jablunkov, kie li multe aktivadis per religiaj prelegoj ktp. Li mortis trankvile en aĝo de 94 jaroj la 31-an de januaro 2014. Post funebra eklezia ceremonio en Havířov-Šumbark li estis vendrede la 7-an de februaro 2014 sepultita en la familian tombon.

Ripozon eternan donu Sinjoro al frato – longjare fidela IKUE-ano – Miloslav Pastrňák, kaj senfina lumo lumu al li, li ripozu en paco. Amen.

MOVADAJ INFORMOJ

PRINTEMPE EN VICENZA. Ĉi-jare la itala sekcio de IKUE ne havos sian nacián kongreson pro la okazigo en Italio de la Ekumena E-Kongreso. Tamen la italaj gefratoj aranĝos denove sian “Printempa Kunveno”-n, tio estas semajnfina renkontiĝo por studado kaj preĝado.

La datoj estas: urbo Vicenza (pronuncu: Viĉenca), la 17-an kaj 18-an de Majo 2014. Du temoj estos pritraktitaj: “Evangelii Gaudium”, la apostola Instigo de Papo Francisko pri la anonco de la Evangelio en la nuntempa mondo, kaj “Esperanto en Expo 2015”, por prezenti la preparatan inform-materialon en Esperanto, kiun la lokaj esperantistoj disponigos dum la Universala Ekspozicio, okazonta en Milano de la 1-a de Majo ĝis la 31-a de Oktobro 2015. La aliĝkotizo por la “Printempa Kunveno” estas 10 eŭroj plus 70 eŭroj por loĝado en dulita ĉambro, aŭ 75 eŭroj por unulita ĉambro, ĉio inkluzivita. Por aliĝi: <http://www.ueci.it/aligxiloj>

La venonta Meso en Esperanto en Bruselo okazos Palmdimanĉon, la 13-an de Aprilo 2014, je la 18a horo en la Kapelo de la Resurekto, strato Van Maerlant 22-24, Etterbeek. Pastro Peter Knauer, SJ prezidos la celebradon (informis: Guido Ricci, el Interreto).

ESPERANTISTA ĈEESTO DUM LA KUNVENO DE TAIZÉ 2013. Kadre de la internacia ekumena junulara renkontiĝo organizata pasint-jarfine de la komunumo de Taizé en Strasburgo, la strasburgaj esperantistoj kunordigis esperantistan grupon kaj budon je la 30-a kaj 31-a de Decembro por diskonigi la internacian lingvon ĉe la junuloj. La Taizé-renkonto kunigas ĉiujare pli ol 20.000 gejunulojn de la tuta Eŭropo en frateca etoso (informis: frato Benoît Ente, el Interreto).

IKUE-RENKONTIĜO EN SVATÝ KOPEČEK U OLOMOUCE. En la semajnfinaĵoj de la 12-a ĝis la 14-a de Septembro 2014 organizos la Ĉeĥa IKUE-Sekcio renkontiĝon en belega pilgrimloko Svatý Kopeček u Olomouce - Sankta Monteto ĉe Olomouc, Ĉeĥio. En la jaro 1985 kadre de la 48-a Kongreso de IKUE okazis en tiea Baziliko de Vizito de Virgulino Maria Sankta Meso kuncelebrata de 12 sacerdotoj – kongresanoj. La gracan bildon de la Virgulino Maria en belega baziliko kronumis okaze de sia vizito en Majo 1995 Papo Johano Paŭlo la Dua. Al la partopreno invitas la Ĉeĥa IKUE-Sekcio. Pliaj informoj kaj aliĝilo estas akireblaj el retpaĝo: <http://www.ikue.org/cz/svatykopecek/svatykopecek.htm>

PERSONOJ

MAX JOSEF METZGER NE FORGESITA. Naskita la 3-an de Februaro 1887 en Schopheim (Germanio), li estis katolika pastro, esperantisto kaj longe aktivis en Graz, kie li inter 1918 kaj 1928 eldonis la revuojn “Blanka Kruco” kaj “Katolika Mondo”. Li estis prezidanto de “Internacio Katolika” (IKA), organizaĵo, kiu dum iom pli ol unu jaro anstataŭis IKUE (http://www.esperokatolika.org/ek19811985/ek1983_12.htm#4). Pro siaj pacismaj konvinkoj li estis kondamnita al morto de nazia popola kortumo kaj ekzekutita la 17-an de Aprilo 1944 en la punprizonon Brandenburg-Görden. En Berlino, kie li vivis antaŭ sia morto, la kunlaboro de esperantistoj kun paroĥo sankta Jozefo progresas. Oni planas vojaĝon al la ekzekutejo en Brandenburg-Görden okaze de lia mortotago. DVD pri la vivo de Metzger estos publike prezentata en la granda salono de la paroĥo. Plie, la Esperanto-Ligo Berlino proponis, ke la parko apud la paroĥo ricevu la nomon “Esperanto-Parko”. Aktualaj Informoj troveblas ĉe: <http://esperanto-wedding.blog.de/> (informis: Roland Schnell, el Interreto).

P. GIACOMO BIANCHINI. La 12-an de Januaro en la paroĥa preĝejo de Cimpello ĉe Pordenone (Italio) oni solenis la 60an datrevenon de la morto de pastro Bianchini per solena sankta Meso. Antaŭ unu jarcento li estis unu el la pli gravaj figuroj de la itala esperantismo, ĉefe, sed ne nur, en la katolika movado: li estis ankaŭ sciencisto, pionira IKUE-ano kaj aŭtoro de pluraj verkoj en kaj pri Esperanto kaj la latina. Jam en 2005 kaj 2010 okazis memor-solenaĵoj honore al

pastro Bianchini kaj la 7an de Februaro 2014 lia biografio estis prezentita en la regiona radio-elsendo por Friulo de la itala ŝtata radiotelevido. Pliaj biografiaj informoj: http://eo.wikipedia.org/wiki/Giacomo_Bianchini

P. ÉMILE PELTIER: honorado planata. La fondinto de E.K. ripozas en tombejo “L’égaliè” de Lourdes. Lia tombo kuŝas malantaŭ la steleo de familio Soubirous. La vicprezidentino de IKUE, Marija Beloŝević, kiu estos en la fama pilgrimloko en Majo por gvidi grupon de pilgrimuloj, invitas la IKUE-anojn kunpartopreni en la omaĝo ĉe la tombo de nia pioniro, kiun ŝi planas realigi sabaton, la 17-an de Majo, je la 14a horo. Por pliaj informoj, skribu al ŝia adreso, publikigita en la lasta paĝo aŭ al ŝia retpoŝta adreso: <marija@catholic.org>.

EL INTERRETO

IKUE EN FEJSBUKO. Pli kaj pli kreskas la kvanto da informoj, tekstoj, bildoj, kalendaroj en la fejsbuka paĝaro de IKUE, prizorgata de la vicprezidentino de IKUE Marija Beloŝević. La paĝo estas aŭtentika minejo de informoj pri la vivo de la Eklezio kaj de la katolika E-movado. Ĉiutage oni trovas meslegaĵojn. Krome, oni regule trovas tie la tradukojn de la Tŭiteraj mesaĝoj de Papo Francisko, same videofilmojn pri diversaj okazaĵoj. Ankorau ĉe la paĝo, estas prezentitaj meditoj pri la dimanĉa evangelio, preskaŭ ĉiuj novproklamitaj beatuloj kaj sanktuloj de 2013. Por viziti ĝin, alklaku la simbolon, kiu aperas alte kaj dekstre en la frontpaĝo de www.ikue.org aŭ tajpu en via krosilo: <https://www.facebook.com/pages/Internacia-Katolika-Unui%C4%9Do-Esperantista/263471327120529>

LITURGIAJ TEKSTOJ POR ADVENTO KAJ KRISTNASKO. Vitor Luiz Rigoti dos Anjos disponigis en sia persona retpaĝo la tekstojn el la Breviero, nome la dua liturgia legaĵo de ĉiuj tagoj de Advento kaj Kristnasko. Jen la respektivaj paĝoj: Adventa Tempo – http://vitorluiz.6te.net/?page_id=840

Kristnaska Tempo – http://vitorluiz.6te.net/?page_id=851

Tagoj de Sanktuloj – http://vitorluiz.6te.net/?page_id=853

Komentoj kaj korektoj estos ĉiam bonvenaj. (Informis: Vitor Luiz Rigoti dos Anjos, el Interreto).

B. MARKO EL AVIANO (1631-1699). Estis aldonita paĝo en Esperanto ĉe la TTT-ejo de la Komitato por la sanktulproklamo de beata Marko el Aviano: <http://www.beatomarcodaviano.it/esperanto/> (Informis: Antonio De Salvo).

ETA DOKUMENTFILMO. Okaze de la 50a datreveno (1964-2014) de la pilgrimo de Papo Paŭlo la 6a al Sankta Lando, la TTT-ejo de IKUE disponigis filmeton pri tiu evento: ĝi estas itallingva kun subtitoloj en Esperanto: www.ikue.org/papoj/paulovi/1964/sanktalandi.flv (grandeco: 50MB).

RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto

La elsendoj okazas trifoje semajne en la sama horo 21.20 MET (20.20 UTC), DIMANĈE kun daŭro 8-minuta kaj MERKREDE kaj ĴAŬDE kun daŭro 9-minuta. Por aŭskulti ilin per la Interreto:

rekte je la indikita horo: <http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp>

laŭpete: http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

arkivo: <http://www.radio-vatikana-esperanto.org> — **Android:** <http://rv.va/android>

i-phone/i-Pad: <http://rv.va/iphone>

Skribu al: **RADIO VATIKANA - ESPERANTO**

SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO

Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>

Por ricevi retpoŝte la informilon de RV:
petu abonon al <promo@vatiradio.va>

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikaj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provekzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe informante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La baza jara kotizo de membroabonanto estas 25€, sed ĝi varias laŭ la lando: petu informojn rekte de la landaj reprezentantoj.

Se Via lando ne estas listigita ĉi tie, bonvolu kontakti rekte la Centran Oficejon de IKUE. Membroj de IKUE rajtas aboni tra IKUE la KELI-revuon "Dia Regno" kontraŭ 10,00€. Membroj de KELI rajtas aboni EK kontraŭ 12,50€, pagendaj al la KELI-kasisto.

Argentino	Daniel A. Cotarelo García, Rivera Indarte 232 P.1 A, RA-1406 Buenos Aires
Aŭstrio	Hans M. Maitzen, Endemanngasse 6-18/1/24, A-1230 Wien <i>EK-peranto:</i> Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg
Belgio	Walter van den Kieboom, Wapenplein 17 - 8 , B-8400 Oostende <i>EK-peranto:</i> Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen
Brazilo	Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos Rua Dos Azuloes,#05, Barrio Eurico Salles, BR-29160-290 Serra ES <i>EK-peranto:</i> Brazila E-Ligo, C.P. 03625, BR-70084-970 Brasília DF
Burundio	Jean Thomas Mishosi Birindwa, B.P. 781, Bujumbura
Ĉeĥa Resp.	Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice
Danlando	Eugeniusz Rybarczyk, Bispeparken 29.1th, DK-2400 Copenhagen NV
Estonio	Vjačeslav Hromov, p.k. 623, EE-12602 Tallinn
Francio	Anne-Marie Chaney, 56 rue Corvisart, F-75013 Paris
Germanio	Stefan Lepping, Mellinstr. 5, D-59457 Werl
Hungario	P. Lajos Kóbor, Templom u.1, H-9400 Sopron 7
Italio	Giovanni Daminelli, Via Lombardia, 37, I-20099 Sesto S.Giovanni
Kamerunio	Gabriel Anda, B.P. 911, Edea
Kroatio	Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb
Kubo	Alberto José García Fumero, Calle 26 No 3313 E/33 y 35 Playa CP-11300 Ciudad Habana
Latvio	Jazeps Šlars, Zvaigžņu 20-26, 1009 Riga
Litovio	Adomas Mečislavas Grikpedis, A. Povilaičio 12-200, LT-2050 Vilnius
Nederlando	Simon Paul Smits, Deken Tomaslaan 32, NL-4453 AL 's-Heerenhoek
Nov-Zelando	Mike Leon, 171 Oxford Terrace, Lower Hutt
Pollando	Zdzisława Kaźmierczak, ul.Drukarska 39/19, PL-53-311 Wrocław <i>EK-peranto:</i> Janina Trzpił, al.Wyszyńskiego 5Fm20, PL-21-560 Miedzyrzec Podlaski
Portugalio	<i>EK-peranto:</i> Portugala E-Asocio, rua Dr J.Couto 6 r/c A, P-1500 Lisboa
Rumanio	Cristian Mocanu, Str.Grivitei 23, RO-2700 Deva
Slovakio	Pavol Petrik, Na Dujave 3, SK-082 56 Pečovská Nová Ves
Tajlando	P. Marcel Perray, G.P.O. Box 1846, Bangkok 10501
Ukrajnio	P. Serhij Prudko, a.k. 101, UA-07300 Vyšhorod